Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 31an de januaro 2013, per Skype.

(Protokolo aprobita la 15an de marto 2013.)

Partoprenis:
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne (ĝis meze de punkto 7)
Eli Eriksen Fitjar en Bergen (forestis pro teĥnikaj problemoj ekde punkto 4)
Ulf Lunde en Os (dum la dua parto de punkto 3, fine de la interkonsiliĝo)
Mario Machlik en Tromsø

0. Tagordo
La tagordo estis aprobita, sed pro praktikaj kialoj punkto 3, origine «Seminario», dividiĝis en du partojn, punktojn 3 kaj 7.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 13an de decembro 2012
La protokolo estis aprobita.

2. Ekonomio
La kasisto Anne Karin Bondhus provizore ne havis aliron al la kontoj, kaj ne povis raporti ĉi-foje.

3. Seminario: ĝeneralaj aferoj
La seminario okazos per Skype la 2an de februaro. Mario Machlik laboris pri la programo. Aliĝis Oslo, Trondheim, Tromsø, kaj kelkaj unuopuloj.

4. Strategia plano
Forestis Asbjørn Lindh, kaj pro teĥnikaj problemoj Eli Eriksen Fitjar forfalis el la konferenco. Ni ne estis kvorumaj, kaj ne deziris tro diskuti la strategian planon.

5. Jarlibro 2013
Kasisto Anne Karin Bondhus sendos ĝisdatan membronombron al UEA.

6. Eventualaĵoj
Ni iomete diskutis kian tekston ni uzu pri la Landa Kunveno en la programo de Språkåret.

7. Seminario: teĥnikaj aferoj
Ni diskutis kaj provis teĥnikajn aferojn koncerne la seminarion.

La interkonsiliĝo daŭris 19.32–21.32.
La venonta interkonsiliĝo okazos la 21an de februaro 2013.
Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.